

Johann Wolfgang von Goethe,  
Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —  
silent',  
tra pinopingloj  
la senvent'  
spiras sen fort';  
arbare la birdoj ekmutas.  
Pretu, aludas  
silento pri mort'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Same tiel

*tradukita de Richard Schulz*

Super ĉiuj montoj  
Trankvil',  
Kaj ĉiuj fontoj  
Sen babil';  
Aŭdas vi ne  
Birdetan ĉirpon arbare.  
Pensu prepare  
Pri la pere'!

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Из Гёте

*tradukita de Muxaил Лермонтов*

Горные вершины  
Спят во тьме ночной;  
Тихие долины -  
Полны свежей мглой;  
Не пылит дорога,  
Не дрожат листы ...  
Подожди немногого,  
Отдохнешь и ты.

...

Johann Wolfgang von Goethe,  
Egalajo (Noktokanto de  
migranto)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super ĉio iĝas  
Kviet',  
Kaj ne moviĝas  
Pro ventet'  
Iu foli';  
Silentas la birdoj ĉirkaue.  
Atendu – baldaue  
Ripozos vi.

...

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en la Rusan de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27).

Arg-356-1908 (2013-12-12 22:16:00)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en <http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm>. Vidu ankaŭ la retejon <http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986>. Pri la poeto Lermontov vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил\\_Лермонтов](http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил_Лермонтов). La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)